La postkonferenco finiĝos la 28an de julio post la vespermanĝo. Se vi volas partopreni en la postkonferenco, vi devas aliĝi per la aliĝilo en la sekva paĝo, **antaŭ la unua de junio**. Se ni ricevos vian aliĝilon post la unua de junio, ni ne plu povos garantii al vi dormoĉambron por la aldonaj tagoj.

Postkonferenco

Eblas resti en la loĝejo dum la postkonferenco. Vi pagas po 20 eurojn por nokto kaj matenmango. Iuj postkonferencanoj jam indikis sur sia aliĝilo ke ili volas resti ĝis la 27a aŭ la 28a de julio kaj jam pagis tiujn noktojn. Tial ni havas du partojn en la suba postkonferenca aliĝilo: unu por kiuj jam pagis la postkonferencajn

☐ Mi partoprenos en la postkonferenco en Flandrio, je **sabato 27.7.2002** kaj pagas por tio € 12,50 € …….

☐ Per mia aliĝilo mi jam rezervis ĉambron por la nokto de la 26.7.2002 (= vendredo al sabato)

aŭ

☐ Mi aldone mendas ĉambron por tiu nokto kaj pagas por tio € 20,00 € …….

☐ Mi partoprenos en la postkonferenco en Valonio, je **dimanĉo 28.7.2002** kaj pagas por tio € 12,50 € …….

☐ Per mia aliĝilo mi jam rezervis ĉambron por la nokto de la 27.7.2002 (= sabato al dimanĉo)

aŭ

☐ Mi aldone mendas ĉambron por tiu nokto kaj pagas por tio € 20,00 € …….

DO ENTUTE MI PAGOS .€ ……..

Tion mi pagas al la jena konto de Esperanto 3000 Leuven:

☐ FEL: edum-k (= preferata ebleco) (bv. indiki unu el la tri kontoj: ☑)

☐ UEA: edum-k (= dua ebleco)

☐ banko: 734-3331944-03 en Belgio, aldonu la bankkostojn

Dato de mia pago: ____/ ____/ 2002.

☐ aldonaj sciigoj kaj/aŭ demando:

Subskribo:

Loka organizanto: esperanto3000@esperanto.be
http://www.esperanto.be/esperanto3000/
Rue Menada 44
1320 Hamme-Mille

Dua informilo pri la IEK

Organiza societo de internaciaj Esperanto-konferencoj

Internacia Esperanto-Konferenco 2002

En oficiala kunlaboro kun la Universitato K.U.Leuven
kaj kun la Urbo Leuven (Loveno)

Scienco kaj Socio

Leuven (Belgio), 20-26 julio 2002

Ĝeneralaj informoj pri la konferenca lando

Belgio: ŝtato ekde 1830

La konferenca lando de 2002 estas relative nova ŝtato. Malgraŭ tio la popolo jam ekzistas ekde la malnova historio. Julius Caesar bone konis ĝin, kiel ni povas legi en liaj *Commentarii de bello gallico* , kie li pritraktas ls genton tiel: "… horum omnium fortissimi sunt Belgae" (de ĉiuj [gaŭloj] la belgoj estas la plej kuraĝaj).

En la nuna tempo Belgio estas konata en la tuta mondo pro siaj lingvaj problemoj. Ekzistas tri oficialaj lingvoj en tiu ĉi malgranda lando: la nederlanda, la franca kaj la germana. Precipe la nederlandlingvaj flandroj kaj franclingvaj valonoj daŭre disputas inter si. Belgio ankoraŭ ekzistas, sed ĉu ankoraŭ ekzistas belgoj nuntempe? Ŝerce oni foje diras al eksterlandanoj: "Ekzistas nur unu belgo – la reĝo de Belgio – la aliaj enloĝantoj estas flandroj aŭ valonoj".

Flandrio: la nederlandlingva parto de Belgio

Belgio estas divita en 10 provincoj inter kiuj kvin nederlandlingvaj: Okcident-Flandrio, Orient-Flandrio, Antverpeno, Limburgo kaj Flandra Brabanto. Norde kaj oriente la regiono havas landlimon kun Nederlando, okcidente kun la Norda Maro kaj sudokcidente kun Francio. La suda limo ne vere ekzistas, kvankam ĝi estas determinita de la leĝo. Ĝi estas la tiel nomata 'lingvolimo', sed kiu volus laŭiri ĝin, tiu certe sentus sin en Valonio, ĉar li aŭdus paroli nur la francan. Flandrio havas riĉan historion kaj la flandroj estas mondfamaj pro laboremo kaj persistemo.

Leuven: flandra urbo

Leuven estas flandra urbo, ĉar ĝi situas en Flandrio, sed pli bone ĝi nomiĝus 'internacia urbo'. Ne nur ĉar ĝi estas urbo de la ĉi-jara IEK, sed ĉefe ĉar la loĝantaro havas internacian konsiston. Plej konata en Leuven estas la universitato, kiu havas diverslandajn studentojn. Kie estas studentoj, estas festoj. Kie estas festo, estas biero. Jam antaŭ pli ol 2000 jaroj la belgoj sciis fari bieron. Ĝis hodiaŭ ili neniam forgesis tiun procedon. Ĉi tie en Leuven troviĝas la plej moderna bierfarejo de Belgio.

La konferenco

Ni bonvenigos vin ekde vendredo la 19a de julio je la 3a posttagmeze. Se vi venos en tiu vendredo, vi povos viziti la "Beleuvenissen". Beleuvenissen estas loka festivalo kiu organizas en ĉiu vendreda vespero senpagajn muzikajn prezentadojn en Leuven. Sabate, la aliaj partoprenantoj alvenos kaj la konferenco startos sabaton vespere per inaŭgura vespermanĝo, inkluziva en la kotizo. Antaŭ ol ni tion konscios, venos jam vendredo la 26a de julio. Tiam la konferenco finiĝos post la tagmango.

Kion vi devas fari nun?

AL ĈIUJ ni demandas: «Bonvolu plenigi la suban formularon kaj **TUJ** resendi ĝin **ANTAŬ LA 31a DE MAJO** al» **(post la 31a de majo ni ne povos garantii ĉambron en la rezidejo!)**

💻 (prefere al:) esperanto3000@esperanto.be
✉ (alternative al:) Esperanto 3000 Leuven, R. Menada 44, BE 1320 Hamme-Mille

Tie ankaŭ vi povas ricevi aldonajn informojn, informilojn kaj aliĝilojn.
Se vi ne partoprenos al postkonferenco, vi nur devas plenigi la unuan parton.

Familia nomo : .....

Persona nomo: .....ula / ina (elektu)

Strato, numero .....

Poŝtkodo, urbo.....

Lando..... Naskiĝjaro .....

Retadreso.....

☐ Mi venos aŭte al la konferenco kaj mi volas kaj povas kunporti homojn en mia aŭto dum turistaj ekskursoj.
Mi povas kunporti …….. homojn.
☐ Mi ne venos aŭte kaj volas kunveturi dum turistaj ekskursoj.
☐ Mi partoprenos viziton al Interbrew (kaj do ne viziton al la kastelo Arenberg nek la prelegon de J. Dörr) en **ĵaŭdo 25.7.2002** posttagmeze
☐ Mi alvenos je la ..... de julio (konferenco = 20.7, Beleuvenissen = 19.7)
☐ Mi foriros je la ..... de julio (konferenco = 26.7, Beleuvenissen + postkonferenco = 27.7 aŭ 28.7)

La postkonferenco

La konferenco finiĝos vendredon la 26an de julio sed se vi ne povos rezisti la ĉarmon de la Belgio aŭ se vi volas vidi pli, vi povos partopreni al la postkonferenco ĝis dimanĉo la 28a de julio.
Sabate, ni vojaĝos al la belega urbo Gent kaj al la mezepoka urbeto Brugge. Dimanĉe, ni unue vizitos la modernan Louvain-la-Neuve. Poste ni vojaĝos al la impona Namur kaj post la tagmanĝo tie, ni vizitos la famajn kaj pitoreskajn ĝardenojn de Annevoie. La lasta haltejo estas en Dinant. Tie vi povos libere promeni tra la urbo aŭ grupe viziti la famajn grotojn "Merveilleuse".

Aliaj gravaj informoj

Alveninte vi **unue iru al la akceptejo**, kiu troviĝas en la unuetaĝa pavilono "De WAAG" de la konferenca parko, meze inter la parkejoj P1 kaj P2 (vidu la mapon). Tie vi ricevos ĉiujn konferencajn dokumentojn kaj la ŝlosilon de via ĉambro.

La **transporto por ekskursoj** okazos per privataj aŭtoj de la partoprenantoj. Ni **ne** luos aŭtobuson. Tial ni petas al vi indiki sur la formularon en la paĝo 11 ĉu vi pretas kunporti aliajn konferencanojn al ekskursoj.
Tiuj kiuj ŝatas kunveturi kun aŭto de alia partoprenanto al ekskurso, mem trovu kaj interkonsentu alian. Tio eblos surloke, kie vi trovos liston de la partoprenantoj kiuj pretas kunporti iujn. Ni konsilas danke donaci etan monsumon al la ŝofore aŭ ekzemple pagi parkejon se vi kunveturas.

Tag**manĝo**n en la labortagoj, do de lundo ĝis vendredo, vi povos mendi malmultekoste en la studenta restoracio Alma III, kiu troviĝas en la konferenca parko.
La dimanĉaj tag- kaj vespermanĝoj okazos en Leuven, la marda vespermanĝo en Bruselo.
La interkona vespermanĝo (kun kokinaĵo) en sabato la 20-a estas inkluzivita en la kotizo kaj do prizorgata por vi de la organizantoj.
La aliajn vespermanĝojn vi havu en aliaj restoracio, inter kiuj De Spuye kaj Waaiberg estas plej proksimaj, aŭ vi povas mem ion prepari.
La matenmanĝoj estas preparataj de la organizantoj kaj alireblaj (nur) por la partoprenantoj kiuj loĝas en la studenta rezidejo aŭ je aldona pago (surloke en la akceptejo) de po 4 eŭroj.

Ĉiam portu vian insignon. Ĝi estas via enirpermesilo.
Se vi loĝas en la konferenco aŭ aparte pagis por matenmanĝo, ne forgesu kunporti ĉiumatene la ĝustan kuponon al la manĝejo.

En la konferenca sekretariejo haveblos speciala **stampo** por la IEK kiun ni volonte metos sur viajn leterojn kaj poŝtkartojn.

Se vi havas problemojn, vi povas telefoni al la loka organizanto per la porteblaj telefonoj:

Marc Vanden Bempt	++32 495 16 97 98
Myriam Van Der Steen	++32 497 47 35 38
Roger Goris	++32 494-70 75 96

Bonvolu uzi ĉi tiujn numerojn nur de vendredo la 19a de julio ĝis dimanĉo la 26 de julio 2002!!

La konferencejo

La konferencejo konsistas el pluraj konstruaĵoj. La plej multaj el ili situas en vasta kaj belega parko kun multe da arboj, herbejoj kaj aliaj verdaĵoj, tra kiu fluas kvieta rivereto. Tiu ĉi oazo tamen troviĝas tuj apud la urbo, kiu estas facile atingebla piede.

Ni rezervis sufiĉe da ĉambroj por po unu persono. La ĉambroj estas grupigitaj en malgrandaj konstruaĵoj, meze de la parko menciita supre. Estas komunaj necesejoj kaj komunaj duŝoj sur ĉiu etaĝo. La kvinetaĝaj konstruaĵoj ne havas liftojn sed ni atentos pri via juneco se ni scias ĝin.

Pro la asekuro, estas malpermesata ke pli ol unu persono loĝu en la sama ĉambro. Se okazus io en ĉambro en kiu loĝas pluraj personoj, ne la organizantoj sed vi respondecos. Ĉiu loĝanto tial pagu kaj havos sian propran ĉambron. Ĉiu etaĝo havas 11 ĉambrojn, tiel ke en ĉiu etaĝo loĝos maksimume 11 personoj.

Dum la konferenco, oni povas skribi al la konferenco mem:
IEK 2002 LOVENO
p/a Rulenslaan 10
BE 3020 Winksele

La programo

Ĉi-jare ni elektis temon kiu, pro sia ĝeneraleco, povos interesi multnombran publikon el tre diverĝaj fonoj, nome la rilaton inter scienco kaj socio. Efektive, ni ja vivas en mondo, en kiu la scienco ludas tre gravan rolon kaj, vole nevole, influas ĉiujn kaj ĉion. Ni nur pensu pri la elektronika-tekniko, la biogenetiko, la medicina scienco, la psikologio kaj ĝiaj aplikaĵoj en la ĉiutaga vivo, kiujn neniu el ni plue povas eviti aŭ ignori. La scienco do estas ne nur afero de scienculoj, sed ĝi koncernas nin ĉiujn.
Se vi legas la titolojn de la prelegoj (vidu sube), vi rimarkos ke la temoj de la prelegoj estas ege diversaj kaj interesaj.
☆ Lunde: ‘Scienco kaj Malscienco: kio estas, kaj kiel ili influas la socion’ kaj

‘Vero, duonvero kaj malvero en la asertoj pri la minacata naturo’;
- ☆ Marde: ‘La socio kaj la lingvosciencoj: reciproka influo’ kaj ‘Morala edukado en nuntempa socio’;
- ☆ Merkrede: ‘Diru al mi la veron, doktoro’ kaj ‘Kiom da socioj, tiom da sciencoj’;
- ☆ Ĵaŭde: ‘Scienco kaj fundamentalismo’, ‘Indeksoj kaj informaj serĉiloj’ kaj ‘evoluigado de IC’oj’.

Kiu ne estas esperanto-spertulo povos partopreni en konversaciaj rondoj kiuj estos organizataj lunde ĝis ĵaude, paralele al la prelegoj kaj dum la tagmanĝoj.

Ankaŭ ekster la temo de la konferenco estos prelegoj:
- ☆ Sabate (alvenu antaŭ la 16a!): 'lumbildoj kaj videofilmo pri Leuven';
- ☆ Dimanĉe: 'Prezentado de la kandidataj libroj por la OSIEK-premio' kaj 'Rapidkurso pri la nederlanda lingo';
- ☆ Lunde: filmo kun esperanta komento pri la mikroelektronika centro IMEC. Vizito bedaŭrinde ne eblos ĉar IMEC estos fermita dum la konferenco. Plue: 'Kion legi, interesaj ofertoj en la libroservo' kaj 'Tarokoj kaj Epokoj';
- ☆ Merkrede: 'Esperanto-muziko';
- ☆ Ĵaŭde: 'Problemoj de la baza radikaro de Esperanto'.

Krom prelegojn, ni ankaŭ organizos multajn aliajn aktivecojn.
- ☆ Dimanĉe: meso kaj gvidata aŭ libera vizito al Leuven.
  Vizitu la skoltan muzeon, kiu okaze de la IEK 2002 preparis Esperanto-budon, kiu ankaŭ poste restos;
- ☆ Lunde: vizito al la 'montroĝardenoj' en Hoegaarden kaj oficiala akcepto en la urbodomo de Leuven;
- ☆ Marde: Bruselo:vizito al la urbocentro, aŭ (paralele) al la Naturhistoria muzeo; poste sekvos vizito al la eŭropa kvartalo;
- ☆ Merkrede: vizito al la reĝa muzeo pri Mez-Afriko en Tervuren;
- ☆ Ĵaŭde: vizito al Interbrew kaj vizito al la Arenberg-kastelo en Heverlee;
- ☆ Vendrede: ĝenerala kunveno de OSIEK.
- ☆ Ĉiutage vi povos fari liberajn vizitojn aŭ serĉpromenojn, laŭ surpaperaj gvidiloj kiujn vi trovos en via dokumentujo ĉe alveno. Fine de la semajno premio estos aljuĝita al la gajninto de la serĉpromenoj.

Ankaŭ la vespera programo estas interesa: estos interkona vespero, greka vespero, flandra vespero, kanta vespero kaj vespero en la studenta kaj ĉarma Leuven. En la vendredoj estas "Beleuvenissen", muzika festo en la urbo.
Kaj en ĉiu vespero Floreal Martorell, la estro de Eurokka kaj Vinilkosmo, prizorgos la muzikan parton kaj dancigos la dancemulojn. Vi povas kunporti vian ŝatatan muzikon sur KD aŭ minidisko kaj disponigi ĝin al Floreal por la vespera muzikprogramo. Ilse Jacques klarigos kaj organizos tabloludojn ĝis (mal)frua mateno.

Asekuro

La konferenca kotizo ne inkluzivas asekuron kontraŭ akcidento aŭ malsano de la aliĝinto dum la konferenco. Necesas tial, ke ĉiu aliĝinto zorgu mem pri taŭga asekuro. Diversaj specoj de vojaĝasekuro estas aranĝeblaj en multaj stacidomoj, vojaĝoficejoj, bankoj kaj flughavenoj, antaŭ la foriro.
La konferenco mem ĉiuokaze ne repagas la aliĝkotizon, nek ĝi repagas antaŭpagitajn konferencajn aranĝojn (ekz. postkonferencon, loĝadon), kiujn konferencano malmendas post la limdato, eĉ se tiu malmendo okazas pro malsaniĝo aŭ alia kaŭzo ekster la rego de la mendinto. Estas do konsilinde, precipe kiam temas pri grandaj monsumoj, asekuriĝi kontraŭ nepartopreno. Pri tio oni konsiliĝu kun sia kutima asekuristo.

Pasporto kaj vizo

1. Se vi estas civitano de lando el la Schengen regiono, vi nur bezonos vian pasporton aŭ vian identeckarton (validan almenaŭ 3 monatojn post kiam vi forlasas Belgion) se vi ne forlasas la Schengen regionon dum via vojaĝo al Belgio. La landoj de la Schengen regiono estas Aŭstrio, Belgio, Danlando, Finlando, Francio, Germanio, Grekio, Hispanio, Islando, Italio, Luksemburgo, Nederlando, Norvegio, Portugalo, Svedio.
2. Vi nur bezonas validan pasporton (validan almenaŭ 3 monatojn post kiam vi forlasas Belgion) se vi estas citivano de :
   Andoro, Argentino, Aŭstralio, Bolivio, Brazilo, Britio, Bruneo, Cipro, Ĉilio, Dominika Respubliko, Ĉeĥio, Ekvadoro, El Salvadoro, Estonio, Gvatemalo, Honduras, Hungario, Islando, Irlando, Israelo, Japanio, Kanado, Suda Koreo, Latvio, Liĥtenstejno, Litovio, Kostariko, Kroatio, Malajzio, Malto, Meksikio, Monako, Nikaragvo, Noz-Zelando, Panamo, Paragvajo, Pollando, San Marino, Singapuro, Slovakio, Slovenio, Svisio, Usono, Urugvajo, Vatikano.
3. Principe, vizitantoj el ĉiuj ceteraj landoj bezonas vizon. Tamen la kriterioj varias, kaj povas esti malpli severaj ol la supraj listoj sugestas. Civitanoj de landoj sen diplomatiaj rilatoj kun Belgio povas peti al la diplomatiaj instancoj de alia lando (kiu ja havas diplomatiajn rilatojn), ke tiuj akiru ĝin, klarigante, ke temas pri la IEK-konferenco de Esperanto. Okaze de malfacilaĵo ĉe akiro de vizo, oni bonvolu skribi al LKK, donante ĉiujn kutimajn informojn (pri pasporta numero, dato kaj loko de naskiĝo, familia stato k.s.). Ni ne garantias helpon sed jes klopodos.

Donacoj

La konferenco bonvenigas donacojn por la konferenca fonduso. Ĝi ebligos partoprenon al konferencanoj el landoj kun (trans)pagaj malfacilaĵoj.

La ĉi suban tekston en la nederlanda vi montru al la busŝoforo de la aŭtobuso 7,8 aŭ 9. Tekstas: “Mi estas Esperantisto kaj ne parolas la nederlandan. Ĉi vi bonvolos informi min kiam mi devos eliri la aŭtobuson por la Esperanto-Konferenco: ‘Groenveld’, ĉe la studentloĝejo. Dankon!”

Aan de buschauffeur
Ik ben Esperantist en spreek geen Nederlands. Wil U mij verwittigen wanneer ik moet afstappen voor de Esperanto-Conferentie : ‘Groenveld’, bij de studentenwoonwijk. DANK U!!

Praktikaj informoj pri Belgio

La Mono: ekde marto 2002, la eŭro estas la sola oficiala mono en Belgio. La malnova ‘belga franko’ ne plu validas!
En Belgio estas multe da monaŭtomatoj kiuj akceptas kartojn ‘Visa’, ‘Mastercard’ kaj ‘Mister Cash’ kaj oni povas pagi per tiuj kartoj en ĉiuj grandaj butikoj, en la plej multaj restoracioj kaj hoteloj.
La bankoj estas malfermaj semajne ekde la 9a ĝis la 16a kaj ofte sabate ekde la 10a ĝis la 12a. **La butikoj** estas malfermaj semajne ekde la 9a ĝis la 18a kaj sabate ekde la 9a ĝis la 17a.
La vetero en Belgio estas neantaŭdirebla. Ni esperas ke ne okazos, sed sciu ke foje povas pluvi eĉ en tiu momento de la jaro. Do ne forgesu vian pluvumbrelon! Normale, la temperaturo estas inter 15 °C kaj 22 °C.
Taksioj estas multekostaj kaj oni ne devas doni dankmonon al la ŝoforo.
Dankmono estas ĉiam enkalkulita en la prezoj.
Elektra tensio en Belgio estas 230V, 50 Hz.
Se vi volas scii kion vi povas kunporti al Belgio sen pagi ion al la **dogano**, bonvolu sciigi nin kaj ni sendos al vi la longan liston.

Ne forgesu...

- vian pasporton! (partoprenintoj en IEK 2001 bonvolu ne ridi ☺);
- vian bonan humoron;
- vian naĝkostumon, se vi volas naĝi;
- vian pluvumbrelon (ni esperas ke vi ne bezonos ĝin) ;
- kunporti littukojn kaj mantukojn se vi estas parttempa partoprenanto ; litkovrilojn vi trovos en la ĉambro;
- prefere partopreni plentempe, do minimume de la 20-a ĝis la 26-a de julio, tiukaze ni disponigos al vi la litkovrilojn, littukojn kaj mantukojn por via restadperiodo;
- ke la krana akvo estas trinkebla;
- kuracistan recepton en la latina lingvo, se vi regule uzas specialajn medicinaĵojn.

Kiel atingi la konferencejon?

Per aviadilo

Flugu al flughaveno Brussel. Tie vi prenu trainon al Brussel kaj de tie al Leuven, aŭ taksion rekte al Leuven.

Per trajno

Leuven estas facile atingebla trajne. De ĉiuj grandaj belgaj urboj veturas trajnoj al Leuven. Por detalaj informoj, vidu www.nmbs.be. Sur tiu retpaĝo, vi trovos vojaĝkalkulilon en 4 lingvoj: nederlanda, franca, germana kaj angla.
Ne forgesu aĉeti bileton en la stacidomo antaŭ ol eniri la trajnon. Bileto de Brussel al Leuven kostas € 3.80.

Per aŭto

En Belgio, aŭtostradoj estas senpagaj! Depende de kie vi venas, vi sekvu:

El la nordo

E19 aŭ E34 al Antwerpen kaj poste E19 aŭ A12 al Brussel kaj fine E40 al Leuven.

El la oriento

E314 al Hasselt kaj Leuven. E42 aŭ E40 al Liege kaj Leuven.

El la sudo

E25 en Arlon kaj poste E411 al Namur kaj Brussel. Fine E40 de Brussel al Leuven

El la sudo aŭ okcidento

E19 al Mons kaj Brussel, poste E40 al Leuven.
E42 al Tournai, poste E429 al Brussel kaj fine E40 al Leuven.

De la E40 aŭ E314 al Leuven

De la E40 sekvu la elirejon “Leuven, E314”. Sur tiu E314(=A2) sekvu la elirejon 15, “Leuven”. Ĉe la dua trafiklumo (I1) dekstren (Celestijnenlaan) kaj post 75 metroj maldekstren (Steengroevenlaan) ĝis la parkejo P1. Eblas ankaŭ uzi la parkejon P2, laŭ alia alirvojo (nur aŭtoj devas uzi enirejon I2).

Per buso

Per trajno al la Lovena stacidomo. Elirante el la stacidomon, vi vidos dekstre la autobusan stacion kie atendas interalie la aŭtobuso 7,8 aŭ 9 (perono 4): al haltejo “Groenveld” (B1) post 15 minutoj.
Se vi buse vojaĝas en Leuven, vi devas aĉeti la bileton ĉe la ŝoforo, ĝi kostas 1 eŭron kaj validas dum unu horo.